

12. La vicprezidanto fermis la kunsidon je la 16 h. 30.

Protokolis  
B. Popoviĉ (p.m.).

*Rimarko.* Se iu membro ne konsentas iun decidon, li rajtas (dum 3 monatoj post la publikigo) postuli referendumon, kiu okazos se tion postulos 10 membroj (p. 8 de la Statuto). B. P.

001 : 3-057 : 408.92 : 061(82)  
5(048.6) = 089.2(82)

## ESPERANTO KAJ SCIENCO EN ARGENTINO

Aparte interesa novaĵo estas la fondo de Scienca Fako en Argentina Esperanto-Ligo, en Buenos Aires. En sia nuna stato, ĝi konsistas el grupo de pluraj kuracistoj, natursciencisto, inĝeniero, universitataj studentoj kaj kelkaj sciencamantoj. Ĝia Provizora Komitato esperas, ke la Fako ekstaros definitive dum la proksimjara Landa Kongreso en Buenos Aires (Aprile). Ĝiaj celoj estas: diskonigo de Esperanto en sciencaj medioj en la lando; strebado disvastigi argentinajn sciencajn verkojn eksterlanden per tradukoj kaj resumoj en E.; arigo de sciencistoj kaj sciencamantoj pretaj helpi al tiaj celoj; interrilato kun similaj institucioj en la mondo.

En kontinento, kie tiom da landoj havas saman lingvon (kaj brazila tre similas hispanan), babeleco estas obseda preskaŭ nur por sciencistoj, kies scio stagnas, t.e. relative retroiras, sen ĝisdata informado. Tio estos ja la gvidmotivo ĉe varbado.

Antaŭ tiu feliĉa okazaĵo, jam estis aperinta en „*Revista de la Unión Matemática Argentina y de la Asociación Física Argentina*” 17 305-328 (1955), verko kun resume en Esperanto: *Teoría de los Magnetofosfenos*, verkita de Prof. D-ro Máximo Valentinuzzi, instiginto al la Scienca Fako. Temas pri interpreto de lumimpresoj elektromagnete induktataj en la vidsistemo. Antaŭ tiu verko, ankaŭ kun resume en E., kvankam tiukaze nur en la aŭtorekzempleroj, aperis *Sobre Restitución de Perfiles en la Imagen Microscópica*, verkita de Carlos Wappers, nuna delegito de ISAE. Ĝin eldonis *Museo Argentino de Ciencias Naturales Bernardino Rivadavia*, la oficiala nacia naturscienca muzeo, en Buenos Aires. Temas pri determino de profilo de objekto prezentanta sin oblikve sub mikroskopo, kiam malmunto estas evitenda. Tre sukcesa ĉe in-sektorganoj.

(Carlos Wappers = Peña 2562 = Buenos Aires = Argentino).

30 : 408.92

## SOCIOLOGIO KAJ ESPERANTO

Okazis en Amsterdam de la 22-29a de aŭgusto 1956 la Tria Mondkongreso de Sociologio sub aŭspicioj de UNESKO, la Nederlanda Registaro kaj la urbo Amsterdam, organizita de la Internacia Sociologia Asocio.

La kongreso temis pri „Problemoj de socia ŝanĝo en la 20a jarcento”.

La enkondukoj kaj prelegoj estis prezentataj en unu el la du kongreslingvoj nome en angla aŭ franca lingvo. En la ĝeneralaj kunsidoj kaj parte en la sekciaj kunvenoj samtempa traduko okazis, en la subsekcioj la enkondukoj kaj diskutoj estis postsekve tradukataj. En la kongreso partoprenis grandnombra rusa delegacio kiu nur parolis la rusan lingvon; specialaj interpretistoj deĵoris kiuj en la ĝeneralaj kunvenoj kaj sekciaj kunsidoj tradukis kun pli aŭ malpli da sukceso en aŭ el la rusa lingvo. Ankaŭ la japana lingvo estis aŭdata en unu el la oficialaj enkondukoj. Tio ĉi ĉio forprenis ne malmulte da tempo dum tiu admirinde bone organizita kongreso. Plue alimaniere sentigis sin la komprenebla deziro apliki, krom la du kongresajn lingvojn, aliajn naciajn lingvojn en la personaj internaciaj kontaktoj.

Partoprenis en la kongreso proksimume 600 personoj el 55 diversaj landoj.

Kelkajn monatojn antaŭ la kongreso konstituiĝis, en kunlaboro kun Internacia Komisiono „Esperanto kaj Sociologio”, Nederlanda Kontakt-Komitato kun la celo akcepti eventualajn esperantistojn partoprenantojn, subteni preparojn de pri-Esperanto-aranĝoj kaj la informadon pri la internacia lingvo Esperanto dum la kongreso.

En la kongresejo librovendista firmao montris grandan literatur-eksponon en kiu aperis la plej aktualaj eldonaĵoj pri sociologio kaj parencaj kampoj. Ankaŭ kelkaj Esperantaj eldonaĵoj ricevis okulfrapan lokon, ekz. „Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo” de prof. I. Lapenna; „Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo”, k.a. de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko; „Jugoslavio kaj Ĝiaj Popoloj”, eldonaĵo de la Slovenia Esperanto-Ligo.

Plue la ebleco ekzistiĝi ĉe mi je dispono de interesiĝantoj — sur tablo tuj apud la ekspozicio en la akceptejo — la seslingvan faldfolion de UEA kaj la kvarlingvan kongrescirkuleron de ISAE.

La prezidanto de Internacia Komisiono Esperanto kaj Sociologio d-ro William Solzbacher el Washington kaj la sekretario Cornelius Keur el Hago estis enskribitaj en ĉi tiuj siaj kvalitoj en la listo de la kongresanoj. Ili ambaŭ dum la tuta daŭro de la kongreso kontaktis kun multaj kongresanoj persone kaj trovis diversfoje favoran okazon informi pri la celado de la komisiono kaj pri la signifo de la Esperantomovado.

Ĉar la kongresa skemo prezentis la eblon okazigi liberajn diskut-grupojn estis planata diskutgrupo pri „Sociaj ŝanĝoj kaj la lingva problemaro en la nuna tempo”; koncerna anonco aperis en la kongresa horaro kaj sur la informtabulo.

Specialaj invitiloj estis prezentataj en angla kaj franca lingvoj en personaj renkontoj aŭ per la kongresa oficejo al difinitaj kongresanoj kiuj povis interesiĝi pri la temo kaj la kunveno. Ĉi tiu okazis la 28an, vespere.

Ĉeestis dek naŭ personoj el Brita Gviano, Britujo, Germanujo, Hindujo, Jugoslavio, Nederlando kaj Usono. Prezidis d-ro William Solzbacher. La diskutoj evoluis en angla kaj esperanta lingvoj kaj estis fiksitaj per sonrubando per la afabla helpo de la kongresdirekcio.

Post enkonduko de la prezidanto pri la internacia lingvoproblemario dum la pasintaj tridek jaroj kaj la nuntempa evoluo el sociologia vidpunkto, s-roj A. K. Datta, A. Charles (Brita Gviano), P-ro Th. de Vletter kaj C. J. Keur (Nederlando) pridiskutis diversajn aspektojn de la koncerna temo kaj la bezonon je internacia lingvo kaj la kvalitoj necesaj kaj dezirindaj por lingvo tia.

D-ro Solzbacher kaj Keur ankaŭ raportis pri la laboro de la „Internacia Komisiono Esperanto kaj Sociologio”, pri ĝia kunveno en Kopenhago en la komenco de aŭgusto, kaj pri projektoj por la estonteco.

Telegramo estis ricevita de Prof. Prins, prezidanto de la Nederlanda sekcio de Int. Kom. Esp. k. Socl. kaj de la Kongresa Kontakt-komitato, kiu bedaŭris esti malhelpita ĉeesti la kunvenon kaj proponis specialan kunvenon por la sekvanta tago kun d-ro Solzbacher kaj Keur.

Mag. Sigismundo Pragano, docento de Esperanta kaj Rumana lingvoj en la Universitato de Amsterdam informis interalie per trafa alparolo pri la eduka kaj scienca uzo de la mondlingvo Esperanto.

Riĉenhava ekspozicio de verkaĵoj en Esperanto, speciale en la kampo de sociaj sciencoj, estis prezentata de d-ro W. P. Roelofs nome de la redakcio de Scienca Revuo kaj de I.S.A.E.

Diversaj parolantoj esprimis la deziron ke

- A. pli granda atento estu donota en sociologia esplorado al la sociologio de la lingvo, kaj
- B. al sociaj tensioj kaŭzitaj de la rivaleco de lingvoj;
- C. al la leviĝo kaj malleviĝo de la prestiĝo de lingvoj kaj
- D. al lingvo-diskriminacio de kiu la malgrandaj nacioj kaj la nacioj en la Malproksima Oriento kaj la Proksima Oriento estas la viktimoj.

Pri la kunveno de la diskutgrupo pri „Sociaj Ŝanĝoj kaj la lingva problemaro” aperos mencioj en la oficiala kongresraporto.

Resume: Atento estis petata kaj vekata en vasta rondo de sociologiistoj por la lingva problemaro en la socio kaj por la internacia lingvo

Esperanto. Ŝajnas trafa metodo ke okaze de grandskalaj kunvenoj kelkaj esperantistoj partoprenas kaj uzas la cirkonstancojn por atentigi pri la taŭgeco de Esperanto en ordinaraj fakaj kontaktoj, sed ankaŭ por aŭdigi per esperanta konversacio ke la lingvo funkcias kaj belsonas.

Je la fino de la amsterdama kongreso sekvis en la universitata urbo Leiden en la hejmo de prof. d-ro J. Prins kunveno de la Int. Komisiono „Esp. k. Sociologio” por preparoli la diversajn realigitajn agadojn nome (a) dum la Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago, kaj speciale (b) dum la Internacia Sociologia Kongreso en Amsterdam, kaj (c) por interkonsiliĝi pri paŝoj farotaj en la venontaj monatoj.

C. J. Keur.

341.12(041) = 089.2

## INTERNACIAJ ORGANIZOJ INFORMAS EN ESPERANTO

Lastatempe aperis du prospektoj presitaj en Esperanto kaj eldonitaj de du gravaj internaciaj organizoj, ambaŭ kun adreso: Genève, Svisujo. Ili estas:

La Internacia Labor-Organizaĵo (ILO), en kiu 70 ŝtatoj estas membroj, kaj en kiu el ĉiu lando la laboristoj havas 1, la labordonantoj 1 kaj la registaro 2 reprezentantojn. ILO ellaboras konvenciojn pri labor-kondiĉoj.

Interŝtata Komitato por Eŭropa Migrado (IKEM), en kiu 26 ŝtatoj estas membroj, kaj kiu faciligas al superflua loĝantaro en Eŭropo elmigri transmaren.

Ke tiuj du gravaj organizoj nun uzas Esperanton por informado ŝajnas esti rekta sekvo de la bona kunlaboro inter UEA kaj Unesko.

373.62(437.1) „1705/1955”

La Alta Teknika Lernejo en P r a h a rememoris solene en Novembro 1956, ke antaŭ 250 jaroj estis tie fondita la unua t e k n i k a l e r n e j o, do multe pli frue ol en la najbaraj landoj. Ĝi estis la unua profesuala lernejo en la Ĉeĥa Regno. Ĝi establiĝis la 30-an de Januaro 1705 laŭ la iniciato de Ing. Chr. Jos. Willenberg, kiu prezentis la proponon al la imperiestro Leopoldo. La fonda dokumento, datita en Wien la 18-an de Januaro 1707 kaj ekipita per la imperiestra sigelo, portas la subskribon de imperiestro Josefo I-a. Ambaŭ dokumentoj estas redaktitaj en ĉeĥa lingvo.

Por celebri tiun ĉi datrevenon, la Ĉeĥoslovaka Akademio de la Sciencoj eldonas (ĉeĥlingve) memorigan verkon kun la titolo:

„Ducent kvindek jarojn teknikaj lernejoj en Praha”.

Dr Artuŝ Sykora, (Prezidinto de la Akademio de Laboro de Masaryk).